## Deziraj korespondoj

Principe individuaj korespond-anoncetoj kun ĝenerala enhavo estu adresataj al kdo R. Bitzer (SAT-Koresponda Servo), Belgradstr. 64/4 M, **München 23**, kun 2 resp. kuponoj. Simplaj anoncetoj en S-ulo kostas 40 cendojn (2 resp. kup.). Aldonoj pri preferoj duobligas la koston. Pago per kuponoj (sed ne per stampitaj aŭ nestampitaj PM!) al kdo C. v. Essen, Rotterdam, aŭ al SAT-Parizo (se tio ne eblas pagu al via landa peranto).

— 40-jara fraŭlo dez. rilati kun kamaradino franca aŭ loĝanta Francion. Adreso: G. Cardona, 23 Cours Tolstoï, **Villeurbanne, Rhône.**

— 3 K-doj dez. fari vojaĝon al Afriko en aŭg. 1951. Ni volas labori dum 2-3 semajnoj en kelkaj landoj (rikolto, ktp). Kiu povos helpi nin? Spertojn pri vojaĝoj en Afriko ni volonte ricevos. Skribu al k-do **Vaartjes**, Meidoornstr. 60 **Hago**, **Nederl.**

LETERVESPERO okazos en Reno 7. febr. Skribu multnombre, prefere pk. il. Resp. gar. Adresu al: Esperanto-Grupo LIBERO-LABORO („Letervespero"), 191 Rue de Nantes, **Rennes** (I & V.), Francio.

# Faktoj kaj komentoj

### Rasproblemo en Usono.

OAK PARK (Kverka Parko) estas unu el la Ĉikagaj „dormejaj" eksterurbetoj, — komunumo kiu sin nomas „burĝa ĉefurbo de l' mondo". Ĝiaj domoj plejparte estas fortikaj, ankaŭ ĝiaj respektindaj loĝantoj.

— Ĉu vi scias, ke nigrulaĉo transloĝiĝos ĉi tien? flustris kverkparka farmaciisto al siaj klientoj antaŭ kelkaj monatoj. La venonto ja estas negro. Li estas ankaŭ unu el la plej lertaj usonaj ĥemiistoj. Percy Levon Julian, diplomito de la Harvarda k Viena universitatoj, sola negro en sia klaso ĉe De Pauw-a universitato, elektita kiel klasparolanto, samklasulo de David Lilienthal, li estas la alte salajrata ĉefsojo-esploranto de la kompanio Glidden de Ĉikago. En tiu ofico, k pli malfrue, P. Julian, nepo de sklavo el Alabamo, elpensis mondfamajn ĥemi-eltrovaĵojn. Tiuj ĉi etendiĝis de proceduj pri sinteza fabrikado de gravaj korpreguligaj hormonoj ĝis ŝaŭm-fajrestingilo, kiu savis multajn usonajn ŝipojn dum la mondmilito.

Sed en Kverk-Parko estas homoj, kiuj pli alte taksas la haŭtkoloron de persono ol liajn inventojn. La du solaj negraj familioj de la urbo loĝis norde. Julian aĉetis karan 15-ĉambran domon en laŭmoda kvartalo k komencis ordigi la ĝardenon, ktp, intencante transloĝigi sian familion ne post kristnasko. Kiam la informo diskoniĝis, la akv-instanco rifuzis fluigi la akvon, ĝis J. ekfaris proceson. Anonimaj telefonantoj minacis lin.

Posttagmeze, ne longe antaŭ la fino de novembro, kiam la laboristoj estis foririntaj, malhela aŭtomobilo haltis antaŭ ja J-a domo. Du viroj perforte penetris en la domon k verŝis petrolon tra ĉiuj ĉambroj; ili deponis nelerte kombinitan fuzaĵon el ĥirurgia gazo ĝis ekstere k ekbruligis ĝin. Tiam ili ĵetis flaman petrol-torĉon tra fenestro k forveturis. Antaŭ ol la ĉambraro ekbrulis, najbaroj vokis estingistojn k la domo estis savita.

Fiera, energia, 51-jara, P. Julian obstinas k anoncis, ke lia familio alvenos ne post novjaro. Li dungis privatan gardiston kun buldogo k fusilo por patroli la bienon. „Ni travivis tiajn aferojn dum la tuta vivo", diris Julian." Al tiaj spiritaj vundiĝoj ni kutimiĝis."

**(Komunikis F. O. Bevan, 27.789, laŭ usona fonto).**

### Malhumana burokratismo.

En nia vilaĝo militdifektito en oktobro 1947 petis pension pro sia kripleco. En aŭgusto 1950 li faris tiun peticion k, ĉar ne venis respondo k li grave malsaniĝis, li ripetis la demandon en oktobro. Meze de decembro la militviktimo mortis pro la sekvoj de la difektoj; respondo de la t.n. zorg-ofico ne jam alvenis. La vidvino, malsana, petis min fari petskribon al la ofico, por ke ŝi ricevu la pension promesitan laŭleĝe. Mi faris tiun skribon, k nun komenciĝos la batalo. Mi ne estas profeto, sed mi jam kolektis sufiĉe da spertoj por aserti, ke ankaŭ la vidvino neniam ricevos la pension, ĉar ŝi ne povos pruvi, ke la edzo mortis pro la militdifektoj k ne estos trovebla kuracisto, kiu atestus tion. Pli necese ol doni pension promesitan ja estas prepari novan militon, ĉar tio estas pli profitdona al la kapitalistoj.

**ASO (Sarlando)**



## LIBERPENSULA ANGULO

### Pri malnovaj formoj kaj pensoj.

Progresemuloj inter ni volonte kantas la strofon de „La Internacio", kiu pledas por forigo de malnoviĝintaj formoj kaj pensoj. Almenaŭ tio estas la nederlanda senco de la frazoj

> „Malnovan mondon ni detruos
> Ĝis fundament' de l' tirani'".

Por montri al vi, ke ankoraŭ ekzistas ridindaj formoj en nia pia landeto, kiu pro sia geografia situo, siaj iamaj vastaj kolonioj kaj dumjarcenta partopreno al la okcidenta kulturo ankoraŭ ludas rolon en la eŭropa koncerto, mi donas kelkajn aktualajn ekzemplojn.

Antaŭe mi diras, ke laŭ naciemuloj, ni ankoraŭ estas la tradicia lando de libero pro la reformaci-batalo, la rifuĝejo de pro religioj persekutitaj (portugalaj kaj aliaj judoj, menonitoj, hugenotoj ktp), sed tio okazis en pasintaj jarcentoj. Nuntempe la mucidiga influo de la diversaj eklezioj estas granda ĉi tie. Ĉar la katolikoj batalas per la lita argumento, do havas relative la plej multajn infanojn kaj estas unuecaj, ili iom post iom difinas la enlandan kaj ankaŭ rimarkeble la eksterlandan politikon. Tamen, la protestanta eklezio estas same malfreŝa. Nun ambaŭ disputas ĉu la dipatrino Mario estis kulpa aŭ senkulpa. Kaprompa problemo en tempo antaŭ minacanta atombomba milito! Jen la anoncitaj ekzemploj:

1. La nederlandanoj tro generas por daŭre trovi sufiĉan vivenspezon inter la kapitalisma kadro.

Ĉu en alia kadro tio eblus, se ni ne forigas la limojn, mi dubas. — La registaro forte instigas elmigradon al Aŭstralio kaj Kanado. Sed ĝi malpermesas la liberan propagandon kaj funkciadon de unuiĝoj, kiuj celas limigi la kuniklumadon. Volonte mi aŭdos de SAT-anoj el Aŭstralio kaj Kanado kia estas la celo de tiu amasa enmigrado en iliaj landoj.

2. Se nederlandano kiel atestanto devas ĵuri antaŭ juĝistaro, oni devigas ankaŭ nekredulojn ĵuri per la nomo de Dio. Kelkaj sektoj rajtas nur „Promesi diri la veron", se ili protestas per religiaj argumentoj. Nekreduloj povas fari la promeson nur, se ili donas skriban klarigon „per la helpo de la juĝisto". Tio signifas en la praktiko ian ĝenan proceduon dum juĝa kunsido kaj spiritan perforton kontraŭ simplulaj atestantoj.

3. En Nederlando estas nur unu cindrigejo de homaj kadavroj, sed ĝi sole povas funkcii pro iu leĝa manko. Se altranguloj aŭ militistoj estas portataj al la cindrigejo, la registaro ne rajtas oficiale reprezenti la nacion, aŭ doni la militistan „honoron". Jam okazis antaŭ kelka tempo, ke japanan altrangulon, mortintan pro akcidento ĉi tie, oni provizore kaj oficiale enterigis kaj post kelkaj horoj neoficiale elterigis kaj cindrigis. Krome iu asekurleĝo malpermesas elpagon de sumeto da mono al rajtuloj, se oni cindrigas la personon anstataŭ enterigi.

Hontinda estas la fakto, ke verŝajne troviĝas plimulto en la parlamento, kiu povus forigi tiujn nejustaĵojn, la t.n. maldekstraj partioj. Ili tamen ne faras tion, ĉar ili je ĉiu prezo ne volas rompi la kunlaboron kun eklezioluloj. Kial? Jen putra frukto de parlamentaj kompromisoj.

Mi scivolas pri la situacio en via lando koncerne tiujn faktojn, kara leganto. Mokemuloj inter ni nomas la nederlandanojn la ĉinoj (antikvaj) de Eŭropo. Ĉu ili pravas?

**J. van Munster (19.836).**

### HIRUDOJ en ESPERANTIO.

El pluraj lokoj atingis nin plendoj pri tiuj ekspluatemaj vaguloj, kiuj volonte nestiĝas en esperantistaj hejmoj Jen ekstrakto el letero de k-dino Hoffmann (24.612): „Nia idealo trudas al ni kvazaŭ subteni fratece unu la alian. Multaj el nia sfero agas laŭ tio, sed aliaj ankaŭ scias pri tio k eluzas aŭ provas eluzi nin por siaj propraj **egoistaj** celoj. Ili staras subite antaŭ via pordo, balbutas kelkajn esp. frazojn, k dum ili estas regalataj ĉetable, komencas uzi la nian helplingvon (ĉar laŭdire ili estas nur komencantoj, aŭ forgesis la iam bonege parolitan esperanton......). Vi donas al tiu fremdulo tranokt-okazon...... unu, du, tri, kvar tagojn, k miregas ke la nova „familiano" tute ne parolas pri foriro. Fine kiam vi aludas pri la daŭro de restado, li surprizite respondas, ke li ne posedas monon por pluen vojaĝi k ne scias kien iri. Malfacile fini vian helpon, k kiam vi fine faras tion, la individuo insultas vin kiel malsocieman aŭ malmolkoran. Sed tia ne bezonas esti la afero: en ĉiuj kazoj mi konstatis, ke la almozpetuloj estis konmencantoj aŭ „iamaj esp-istoj" neorganizitaj, kiuj uzis la kelkajn parkere lernitajn vortojn por trompi esp-istojn."

Landa peranto proponas, ke ĉiu SAT-ano, kiu volas viziti eksterlandan k-don, **kiun li ne persone konas**, ricevu de la loka peranto **legitimilon** pri tio, ke la koncerna estas organizita esperantisto k honestulo. Subteninda propono!


**LA „EPOKO" LIBROJ**

Romanoj taŭgaj por distra horo, klare presitaj, binditaj kartone.

9. **Brulanta Sekreto** kaj aliaj rakontoj de Stefan Zweig. (trad. Schwerin).
10. **Kiso de la Reĝino.** I. Naĵivin. (trad. Staritsky).

Prezo po dol. 0,53 por unu volumo, afranko 0,03 d.

Mendu ĉe
SAT, 67 Avenue Gambetta, Paris 20.